

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (972) • 2025 •



Grupo en Malagasio (raporto sur paĝo 57).

Ekskursanta grupo ĉe la pramo dum Bibliaj Tagoj en Kaub (paĝo 56).



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzá utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon <http://keli.chez.com/>

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Orfejo Klara Zamenhof	51
Vivo de Willibrord ĉefepiskopo de Utreĥto	52
Biblia vorto kaj mia penso	55
Tri raportoj: Sukcesaj Bibliaj Tagoj apud la roko Loreley	56
Malagasio: Esperanto kiel ponto al malriĉuloj	57
KELI en Germana Eklezia Foiro (Mal)konvena informado pri Esperanto	58
Ĉiama memorendaĵo – ĉijare 80-jara	63
Fino de Esperanto-fako de KAVA-PECH	64
Financaj raportoj por 2024	66
Alvoko	70
Informetoj	71
Kanto: Survoje sur la tero	72

Redaktoraĵoj

Kara leganto, ĉi-jare ni memoras la 80-jarojn post la liberigo de la koncentrejo Aŭŝvico-Birkenau. Ĝis nun mi ne enmetis ian memoraĵon pri tio en Dia Regnon, sed finfine en tiu ĉi numero mi enmetis la mesaĝon de UEA. La memortago okazas ĉiu-jare la 25an de januaro, sed la mesaĝo ĉiam estas valida.

Eble plej grave estas ke ni ne nur pensu pri la tiamaj teruraĵoj, sed kunportu al niaj nuntempaj situacioj. UEA skribas: “La homa vivo estas prioritato super ĉiu alia afero homa. Ĉiuj homoj, senescepte, havas rajtojn al vivo, libereco kaj sekureco.”

Ĉiama admono!

Orfejo Klara Zamenhof

Nome de la Asocio Nova Familio
Augustin KAKOZWA kaj Betti MAUL

Karaj samideanoj, kiel vi legadas
niajn informojn en ĉi tiu revuo
kaj alie, ni estas membroj de *Asocio
Nova Familio-Goma* (ANF), kiu nun havas
orfejon nomatan *Orfejo Klara Zamenhof*,
eble iuj inter vi jam estas informita pri
tio.

Dum la UK en Tanzio, kiun unu el
niaj membroj Augustin Kakozwa parto-
prenis unuafoje, vi interesiĝis pri nia
laboro ĉe la movada foiro, ni dankas vin
pro viaj zorgemoj kaj interesoj. Kiel vi
scias, ANF prizorgas orfajn infanojn kaj
esperantigas ilin, ĉi tiu lernojarro ni dis-
donis, dank' al viaj monhelpoj, lerno-
materialojn al tiuj infanoj, kiujn ni
prizorgas. Koregan dankon al ĉiu
donancinto.

Post disdono de la lernejaj ekipaĵoj
ni daŭrigas serĉi monon por pagi la
lernejajn kotizojn por tiuj infanoj sub-
tenotaj. Ĉu vi ekhelpus tiucele laŭ viaj
povoj?

Por via informo, ANF havas nun 215
infanojn, kiujn ĝi subtenas. Sed ĉar ANF
alfrontis gravan finanĉan defion
en la lastaj jaroj, la infanoj sub-
tenataj ne kompletigas la lern-
ejajn jarojn pro nepago de lern-
ejaj kotizoj. Tial

ĉi-jare ni ŝatus subteni nur 125 infanojn,
kiuj estas: 50 infanojn ĉe la bazaj lernejoj,
65 infanojn ĉe la mezaj lernejoj kaj 10
gejunulojn ĉe la universitatoj.

Tial ni petas kaj bezonas la jenajn
sumojn:

- infano ĉe la baza lernejo 130\$ jare
- infano ĉe la meza lernejo 275\$ jare
- junulo ĉe la universitato 600\$ jare

Ni ANF-anoj ĉiam esperas, ke ANF
ne plu havos malfacilaĵojn, kiam ĝi trovos
firmaojn, fondaĵojn aŭ riĉulojn por
financi efike kaj regule.

Por mondonaci bonvolu malfermi la
jenan ligilon:

esperanto.de/eo/asocio-nova-familio-eo

Por vidi la plej freŝan prezenton pri
ANF (Zoom-prelego dum VK la 30an de
novembro 2024) uzu la sekvan ligilon:

youtube.com/live/BBkmPb5d318

Grandan antaŭdankon pro via helpo!!!



Vivo de Willibrord ĉefepiskopo de Utreĥto

Verkis Alkuino kaj Thiofrid

El la latina tradukis Gerrit BERVELING, NL

Daŭrigo

Ĉapitro 25 –

Miraklo ĉe entombigo

La honorinda korpo estis entombigita en marmora sarkofago, kiu unue montriĝis je duona piedo tro malgranda por la tuta korpo de l' Sklavo de Dio. Kiam la fratoj pri tio estis ege tristaj kaj ne sciis, kiel agi, kaj ili forte interdiskutadis, kie trovi ĉerkon taŭgan por la sanktula korpo, subite montriĝis, ke la sarkofago por la Sankta Viro miraklamaniere same plilongiĝis, kiom antaŭe ĝi estis tro mallonga³³.

Kaj en ĝi kun himnoj, psalmokantado kaj ĉiu honoro la korpon de l' Homo de Dio ili entombigis en la Preĝejo de l' menciita monaĥejo, kiun li mem kiel ĉefpastro por la Sankta Triunuo konstruis kaj dediĉis.

Sed ankaŭ flagra haladzo de miraodoro trafis la nazojn de ĉiuj ĉeestantoj, tiel ke unuanime oni devis konstati, ke alvenis helpo de Anĝeloj por la entombigo de l' Sanktulo.

Ĉapitro 26

Anĝela servado

Sed ankaŭ al tre pia lernanto de l' Sanktulo kiu troviĝis je granda distanco, kiu vigilis dum preĝado, lia forpaso estis sciigita.

Li ja atestis, ke la animo de l' Sankta Patro kun granda luma brilado, dum harmonia kantado de Anĝelaj Armeoj estis portita al la Ĉiela Regno. Ankaŭ multaj el la Fratuloj atestis, ke super la mortolito, sur kiu li al sia Kreinto redonis

sian Sanktan Animon, ili perceptis mirindan lumon kaj eksentis flagradon de mirindaodoro, tiel ke pro ĉi indicoj oni ĝenerale kredis, ke tiu loko, kie lia animo foriris al la Sinjoro, estis vizitata de Ĉieluloj.

Ĉapitro 27

Disrompitaj ĉenoj

Per la ŝmirado de oleo, kiu kutimis brili super la korpo de l' Sanktulo, dank' al Dio kun helpa subteno de ilia fido, multaj malsanuloj estis kuracitaj.

Tre ofte saviĝis ankaŭ tiaj homoj, kiuj pentofaris en la sama preĝejo, laŭ praa kutimo ĉirkaŭitaj de feraj katenoj: Subite tiuj ringoj rompiĝis kaj iliaj katenoj defalis. Atestas pri tiu miraklo la ĝis hodiaŭ tiupreĝeje pendantaj ringoj.

Ĉapitro 28

Paralizita virino

Sed unu paralizita virino, kiu sep jarojn suferis pro grandaj doloroj, ĉe kio de tag' al tago ŝia paralizo tiel kreskis, ke ŝi, ĉar ŝiaj membroj rifuzis ĉiun servon, plene dependis de ekstera helpo; nur bruste stertorante en elĉerpiteco apenaŭ spiradi ŝi povis.

De siaj proksimuloj ŝi estis portata al la preĝejo, kie ripozis la Sanktulo de Dio, kaj apud liaj relikvoj oni ŝin metis; tiuloke larmoversite ŝi preĝis, ke la Dia mizerikordo kun helpo de l' sanktulo kompatu ŝin.

Elaŭdite de Dio kaj tuj savite de sia malforto, la feliĉulino, kiun antaŭe portis aliuloj, iris proprapiede hejmen sub ĝoja dankodiro.

Ĉapitro 29

Junulo malsana

Same junulo malsana, kiu ĉiumembre skuiĝis, estis per la manoj de siaj amikoj portita al la korpo de l' Sankta Pastro; eĉ la kapon li ne povis levi, sed se ĝi tiel dire ne estus fiksita al lia kolo, ĝi ĉiuflanken ruliĝus: ĉar kelkfoje li tiel senkonsciiĝis, ke li impresis kiel mortinto.

Tiu, kiel dirite estis metita ĉe la kadavro de l' Sanktulo; sed per kompato de Dio, dum ĉiuj ĉeestantoj ĝin vidis, li tiel subite resaniĝis, ke en li neniu simptomo restis de l' antaŭa malsano aŭ sufero.

Ĉapitro 30

La sakrilegio

Diakono, kiu ne decias je sia ofico, ne timis per malfeliĉa rabo forpreni el la preĝejo de l' Sanktulo oran krucon, kiun la Sanktulo kutimis kun si kunporti dumvojaĝe.

La Fratoj perturbiĝis pro tiu rabo, kaj ne sciis kiu kulpas pri tiu malpia krimo, sed en preĝoj ili konfidis je la Sanktulo de Dio, ke tiu tiel fia krimo ne povas resti kaŝita, kaj per frata amo ili esperis povi revoki la homon al pentemo, en la espero ne pereigi lin; sed tiu, kiu kulpis la krimon, durakore malŝatis sian saviĝon, kiel diras Salomono: Kiam venas malvirtulo, venas ankaŭ malestimo kun honto kaj moko³⁴.

La malfeliĉulo kredis povi resti kaŝita, ĉar li sciis, ke li faris ĝin for de la okuloj

de l' ceteraj; sed al la okulo de Dio, por kiu ĉio estas klara, li ne povis eskapi, ĉar tiu neniam tardas puni la maljustaĵojn de l' siaj³⁵.

Ĉar tiu mizerulo, kiu ne timis plenumi tiun krimon, per mizera subita morto forkaptite pereis, kaj ĝuste ĉe tiu fino de l' vivo al kelkaj el la Fratoj li sin montris kulpa, kaj konfesis sian kulpon pri la krimo, kaj samtempe al ili malkaŝis, kie la rabitaĵon li kaŝis.

Tiel, ho Fratoj, vi vidas, per kiu terura juĝo tiu estas kondamnita, kiu ne timis per ŝtelo profani la Eklezion de l' Sankta Dio.

Tial mi do petas vin, ke en ĉi domo vi gardu ĉastan vivstilon, por ke la Dia Kompatemo vin opiniu inda, ke per la porpetoj de l' Sankta Apostolo Klemento vi estu elaŭdita, kiel antaŭe ni jam diris, ke tiu elaŭskultas la preĝojn de l' malfortuloj en tiu ĉi preĝejo: Kun la longe sopirita saniĝo li lasis ilin hejmeniri.

Tiel do ne estas ia ajn dubo, ke – kiel li kompatas por en videbla maniero sanigi iliajn korpajn difektojn – li ankaŭ ne hezitas, la kaŝitajn malsanojn de niaj animoj pro interveno por ni de sia Sanktulo, kiu ĉi tie korpe ripozas kaj pri kies spirita ĉeesto ni kredas, ĉiutage ne ĉesas elaŭskulti se kun forta fido kaj sincera konfeso ni plorante elverŝas niajn korojn ĉi tie antaŭ la aspekto de lia pieco; en sia Dia Graco Li pretas pardoni, se ni ne tro malviglas ĝin peti.

Ties laŭdo kaj gloro en eternon!

Ĉapitro 31

Patro kiu imitas la filon

Restas ankoraŭ reveni al la sankta Wilgis,

kiu kiel dirite estis la patro de ĉi Sankta Viro, por, ĉe kies historio komenciĝas la unua ĉapitro, pri li traktu ankaŭ la lasta.

Revenis do la jara tago de l' sankta pilgrimado de tiu sama sankta Wilgis, ĉe kiu la pia Abato Aldbert, la posteulo de l' honorinda Ĉefepiskopo, post la religiaj ceremonioj kaj la al Dio ŝuldita honorado komencis kun la Fratoj festmanĝadi. Sed en ĉi klostro neniom oni trovis da vino krom du kruĉoj, el kiuj unu ja matenmanĝe estis malplenigita, la alia flankenmetita por la vespermanĝo. Tial la Fratoj post la vespera laŭdokanto³⁶ por danki pri tiu tago reiris al la refektorio, kie post la sanktaj legaĵoj la menciita Abato al la Fratoj direktis jenajn vortojn³⁷:

“Estas tre inde, honorplenaj Patroj, ke ni festu en ĝojo de l' Spirito niajn honorindajn Antaŭulojn kaj, forirante de l' kutimo ĉiutaga, en senstreĉa etoso cedas al homaj bezonoj – ne en la spirito de drinkado, sed en amo. Neniel sekreton mi farus el tio, se inter ĉi muroj eĉ nur unu Kruĉon mi havus, kiu restis el la matenmanĝo.

Sed nia Dio ja estas pova, per la preĝoj de siaj Sanktuloj tiun ĉi nuran plenigi por ni superflua, por doni al ili honoron kaj al ni ĝojon.

Do lasu nin kun dankemo kaj konfido ĝui la malmulton, kiun ni havas!”

Post kiam unu- kaj du-foje la Fratoj trinkis el la sama kruĉo, la servisto trovis ĝin same plena kiel antaŭe. Kiam tion la Abato aŭdis, li ne ĉesis, kune kun la Fratoj, dankodiri al Dio, kaj tiunokte gajakore kaj mezure ili trinkis, kiom ili deziris, kaj ne sen dankodiro al la Ĉiela Kompatemo.

Ho Patro feliĉa, kiu naskigis tian Filon kaj kion Dio trovis inda por tia posteulo! En li plenumiĝas jena profetaĵo, kiun eblas legi en Readmono:

“Benita vi estos & benita la frukto de via ventro”³⁸.

Notoj —————

33. Temas la ŝtona sarkofago de 1.89m ĉe 0,46m.
34. Sentencoj 18:3.
35. Al la Hebreoj 4:13: Neniu kreaĵo restas kaŝita por ĝi, sed ĉio estas nuda kaj malkovrita antaŭ la okuloj de Li, antaŭ kiu ni donu klarigon.
36. Regulo de benedikto 17:7. La Vespri enhavas kvar psalmojn kun antifonoj.
37. Regulo de Benedikto 38:10. La leganta frato de la semajno ricevu iom da miksita vino, antaŭ ol komenci, pro la sankta komunio kaj por eviti, ke fariĝu al li peze elteni la fastadon.
38. Readmono 28:3–4.

☪

Konsento konstruas, malpaco detruas.

Zamanhofa proverbo

Pri la biografo Alkvino

La vivraporto de Alkvino (ĉ. 735–804) en multaj rilatoj sekvas antaŭajn tradiciojn ek de Plutarĥo¹ – kun propraj kristanaj novigoj, i.a. pri postmortaj mirakloj. Alkvino de Reĝo Karolo la Granda ricevis la taskon klerigi lin, instrui lingvojn al li ktp, kaj ankaŭ bibliotekon li prizorgu. Poste plurajn vivraportojn li verkis, i.a. pri Karolo la Granda same kiel ĉi tiun. Ties tradicia ordigo estis: vivo – vivkutimoj – mirakloj.

1. Tio estis alia arto ol la vera historio. Kleio – muzo de Historio; Kalliopa – muzo de Heroa Epeopeo.

Tyrolean 16a jc., Nacia Arta Galerio, Washington.



Biblia vorto kaj mia penso

Karaj, “Helpu mian nekredemon!” Jes, ankaŭ ni foje troviĝas en simila situacio, kiel la patro de la epilepsia knabo. Ni petas kaj preĝas, sed ĉu ni vere kredas, ke Dio povas helpi nin? Dum nia preĝado, ĉu ni ne diras interne al ni, “Dio, se vi povas fari ion,” tiel dubante pri la potenco de Dio fari ĉion, kion Li volas fari? Ĉiam denove ni legas en la Biblio pri homoj, kiuj venkis ilian nekredemon por fidi al Dio. Ni do preĝadu plenfide, sciante, ke “kion ajn vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos.” (Marko 11:24)

Marko 9:14–24

Kaj veninte al la disĉiploj, ili vidis grandan homamason ĉirkaŭ ili, kaj skribistojn diskutantaj kun ili. Kaj tuj la homamaso, vidante Jesuon, forte miris, kaj alkuris, kaj salutis lin. Kaj li demandis ilin: Pri kio vi diskutas kun ili? Kaj unu el la amaso respondis al li: Majstro, mi venigis al vi mian filon, kiu havas mutan spiriton; kaj kie ajn ĝi kaptas lin, ĝi ŝiras lin, kaj li ŝaŭmas kaj grincigas la dentojn kaj kadukiĝas; kaj mi parolis al viaj disĉiploj, ke ili elpelu ĝin; kaj ili ne povis. Kaj li respondis al ili, dirante: Ho senfida generacio, ĝis kiam mi estos kun vi? ĝis kiam mi toleros vin? venigu lin al mi. Kaj ili venigis lin al li; kaj vidinte lin, tuj la spirito konvulsiiĝis lin, kaj li falis teren kaj ruliĝis ŝaŭmanta. Kaj li demandis la patron: De kiom da tempo okazadas ĉi tio al li? Kaj li diris: De infaneco. Kaj ofte ĝi ĵetis lin en fajron kaj en akvon, por pereigi lin; sed se vi povas fari ion, kompatu al ni kaj helpu nin. Kaj Jesuo diris al li: Kiel, se vi povas! Ĉio estas ebla por kredanto. Tuj ekkriante, la patro de la infano diris: Mi kredas; helpu mian nekredemon.

Jerald Veit

Sukcesaj Bibliaj Tagoj apud la roko Loreley

La tradiciaj Bibliaj Tagoj de la germana sekcio de KELI okazis ĉi-jare de la 19-a ĝis 23-a de marto 2025 en la junulargastejo de la urbeto Kaub ĉe la rivero Rejno. En pitoreska regiono renkontiĝis 25 kristanaj esperantistoj el 5 landoj: Germanio, Pollando, Francio, Nederlando kaj Slovakio. Dum la antaŭtagmezoj ni legis la rakonton pri Josefo kaj liaj fratoj en la libro Genezo, ĉapitroj 37 ĝis 50, kaj diskutis pri ĝi. Posttagmeze ni ekskursis dum belega printempa vetero. Ni migris sur la mondfaman rokon Loreley, vizitis la belegan urbeton Oberwesel kun du imponaj preĝejoj el la 14-a jarcento kaj la doganan burgon Pfalzgrafenstein sur insuleto en la rivero Rejno.

Ni multe kantis en Esperanto – laŭ ADORU, sed ankaŭ laŭ kristana kant-

libro, kiun kunportis niaj polaj geamikoj. Precipe la vesperaj kantadoj kun gitara akompano de Jerzy Stefansky helpis krei belegan atmosferon inter ni. Dum la aranĝo, ni havis tri Diservojn. La unuan gvidis pastoro Wolfram Rohloff en nia junulargastejo, dum la aliaj du estis dulingvaj, ĉar ni ofertis ilin sabate vespere kaj dimanĉe matene kune kun la lokaj paroĥoj en la “duobla preĝejo” de Kaub – katolika kaj protestanta preĝejoj sub unu tegmento.

Por la venonta jaro, ni jam elektis lokon tre proksiman al Kaub, sed sur la alia flanko de la Rejno en St. Goar. Ni denove esperas je tre internacia partoprenantaro, de la 25-a de februaro ĝis la 1-a de marto 2026.



Malagasio: Esperanto kiel ponto al malriĉuloj

En la pasintaj jaroj tre vigliĝis la Esperanto-movado en Malagasio, pro abunda aktivado de pastorino Miora Raveloharison, de la esperantista veterano Henriel Fidilalao kaj nelaste de la juna lerneja direktorino Ranja Zafinifotsy. Pli-malpli ĉiuj malagasaj esperantistoj estas kristanoj kaj fieras pri tio. Sed multaj el ili devas vivi de malpli ol 2 € tage.

Danke al financa subteno de la germana sekcio de KELI, pastorino Miora povis organizi tre sukcesan Kristanan Esperanto-Seminarion en 2024. Fine de januaro 2025 ŝi translokiĝis por unu jaro al Svislando, sed bonŝance Ranja Zafinifotsy pretis transpreni la organizadon de 6-taga seminario en februaro 2025. Ties unua duono estis instrua kaj kultura seminario, dum kiu ni tamen kune preĝis en Esperanto antaŭ ĉiu manĝo kaj komune kantis kristanajn kantojn ĉiu-vespere. La dua duono estis kristana seminario, por kiu ni elektis la temon “Virinoj en la Biblio kaj nuntempa mondo”.

Pastorino Miora ankoraŭ elektis por ni belegan seminariejon kun naĝejo en mirinda ĉirkaŭaĵo, en parko ĉe la bordo de lago. Ankaŭ tiu seminario povis realiĝi danke al la germana sekcio de KELI kaj aparte pro malavara donaco de la intertempe jam 91-jara pastro Bernhard Eichkorn. Alvenis en tiu fabela loko 40 plejparte junaj malagasoj – kaj du kristanaj esperantistoj el Eŭropo, Laima Vilkele el Litovio kaj mi.

En la Kristana Seminario, ni parolis pri gravaj virinoj en la Biblio kiel Miriam, Debora, Rut, Ester, Maria kaj Maria Magdalena. Ĉirkaŭ 10 malagasoj unuafoje en sia vivo prelegis en Esperanto. Aparte interesaj estis diskutoj pri la situacio de virinoj en la nuntempo. La seminarianoj interkonsentis pri la ŝoka takso, ke en Malagasio 50 – 70 % de la edzinoj estas batataj de siaj edzoj.

Fine de la aranĝo, ni petis la partoprenantojn verki etajn raportojn. Iuj raportis pri sia progreso en Esperanto kompare kun la pasintjara seminario (“Nun mi komprenas, kion Ulrich diras”), dum aliaj emfazis, ke ili povis unuafoje en sia vivo viziti naĝejon. Aperte kortuŝe estis, ke 5 partoprenantoj laŭdis, ke la manĝoj estis “sufiĉaj”. Efektive pli ol duono de la partoprenantoj lernis Esperanton en lernejo por aparte malriĉaj infanoj, kiun financas franca fondaĵo kaj kiun gvidas Ranja Zafinifotsy.

En Malagasio, ni povas superi per Esperanto ne nur lingvajn limojn, sed ankaŭ limojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Ni jam fiksis la datojn de nia venonta seminario – de la 25-a ĝis 30-a de oktobro en la sama belega loko, kaj esperas tiam je ankoraŭ pli internacia partopreno.

Vidu grupan foton sur la fronta paĝo.



KELI en Germana Eklezia Foiro

De la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 2025 okazis en Hanovro la 39-a Germana Eklezia Foiro, *Kirchentag*, kun pli ol 100.000 partoprenantoj. La germana sekcio de KELI ofertis tie kune kun Germana Esperanto-Junularo informstandon. Ni elektis sekcion pri internaciaj ĝemeliĝoj kaj prezentis aparte nian kunlaboron kun kristanaj esperantistoj en Malagasio. Tio tre helpis veki pozitivajn impresojn pri la utilo de Esperanto. Deĵoris ĉe nia stando ankaŭ pastoro Miora Raveloharison el Malagasio, kiu nun tempe vivas en Svislando, ĉar ŝi akiris postdoktorigan stipendion por fari teologiajn esplorojn ĉe la Universitato de Lausanne. Ŝi eĉ trovis ĉe nia stando unu malagasan interesatinon pri Esperanto.

Entute dum tri tagoj pli ol 1 000 interesatoj vizitis nian standon kaj agrable interparolis kun ni. Multaj jam konis Esperanton, ekzemple ĉar ili havas esperantistojn inter siaj konatoj. Same kiel antaŭ du jaroj, ankaŭ ĉi-foje pluraj interesatoj ankoraŭ rakontis, ke ili konas Esperanton danke al la pastoro Adolf Burkhardt (1929-2004). Iuj aĉetis esperantan Biblion, lernolibron aŭ vortaron. Aparte impresis nin, ke unu virino jam alparolis nin en Esperanto kaj rakontis, ke ŝi ankoraŭ memoras nin, ĉar ŝi lernis la lingvon pro nia stando du jarojn antaŭe en la Eklezia Foiro en Nurenbergo. Kun almenaŭ 30 el la partoprenantoj de la Foiro ni povis interparoli ĉe nia stando en Esperanto.

Ni jam planas ripeti la standon post du jaroj en majo 2027, kiam okazos la 40-a Germana Eklezia Foiro en Düsseldorf.



(Mal)konvena informado pri Esperanto

Prelego dum kristana kongreso 2024 en Vác, Hungario

Petro CHRDLE, CZ

Enkonduke

Laŭ mia sperto pli efikas negativaj ekzemploj ol pozitivaj, do mi tuj komencu per unu el tiuj: En unu esperanta gazeto eldonata en Ĉeĥio mi legis, ke Max Kašparů¹ deklaris ke *Esperanto estas la plej facila el ĉiuj lingvoj*. Max estas mia bona amiko kaj mi sufiĉe bone konas lian ekzaktan pensmanieron, do mi kuraĝas aserti, ke tion li certe ne povis deklari, ĉar tio estus tre malbona “reklamo” pri Esperanto. Ne nur, ke neniu povas pruvi, kiu lingvo estas la plej facila. Propagandistoj de Toki pona certe (kaj ĝuste) protestus. Sed pli malbona en tiu ĉi deklaro estas, ke ĉiuj personoj, kiuj scias nenion pri Esperanto, tuj konsideros ĝin primitiva (se la plej facila), do la lingvo, kiu ne valoras ilian atenton.

Tamen, ankaŭ mi laŭokaze citas deklaron de Max, ĉar ĉiam publiko pli pozitive akceptas informon, kiun eldiras famulo. Nome lian deklaron en radio, kie li havis prelegon pri la Alzheimer-malsano kaj dume estis demandata de iu aŭskultantino kion ni mem povas fari kiel preventon kontraŭ tiu malsano. Lia respondo komencis atendeble, ke oni rajtas lasi sian cerbon maldiligenti eĉ ne unu tagon – kaj poste li diris, ke kiel la plej bonan rimedon li povas konsili lerni Esperanton, ĉar Esperanto estas lingva mozaiko, dum kies kunmetado oni ekzercas kaj la memoron, kaj la logikon.

Tiu citaĵo estas tre bona informrimedo tuj pro du kialoj: 1e, la aserton oni povas pruvi, ĉar ĝi estas trovebla en la radio-arkivo, kaj 2e, ĉar ĝin eldiris fakulo parolanta pri sia fako, ĉi-okaze fama psikiatro pri psika malsano, do pro la aŭskultantoj li estis fidinda.

Krome, grava pozitivaĵo estis, ke la informo venis kiel respondo al demando kaj validas, ke kiu demandas, tiu perceptas! Kaj ĉar la aŭskultantoj estis homoj kiuj interesiĝis pri la temo, do ankaŭ ili atente perceptis, kion la fakulo respondis al la demandinto.

Tiun specon de informado, kie Esperanto estas menciita en pozitiva maniero parolante pri io alia, pro kio venis la publiko, mi nomas *infektado per Esperanto*. Ni devas akcepti, ĉu tio plaĉas al ni aŭ ne, ke Esperanto aŭ lingva politiko aŭ similaĵoj ne altiros grandan publikon. Tion mi mem spertis plurfoje kaj konkretajn ekzemplojn mi priskribis en *Mia vivo kun Esperanto*² en jenaj subĉapitroj: *Prezento de fremdaj landoj*, *Mistrafito eblo en elementa lernejo*, *Oficialigo de Esperanto dum faka internacia konferenco*, *Kongreso de fervojistoj-radioamatoroj*, *Oficialigo de Esperanto en nupta ceremonio*, *Esperanto kaj la ĉeĥa financofiko*, *Ekscio pri rezultoj post multaj jaroj kaj Ŝanĝo de la temo de artikolo*. Mi esperas, ke laŭ la titoloj eblas almenaŭ iom supozi la



enhavon. Kaj ĉie mi fokusiĝis precipe al multaj obstakloj kaj montras kiel ni sukcesis (en unu kazo ne sukcesis) ilin solvi.

Ne seniluziĝu de ŝajna malsukceso
Ne atendu, ke ĉiu, kiu montris intereson pri Esperanto tuj komencos ĝin lerni! Komprenu, ke ĉies tago havas nur 24 horojn kaj kutime ĝuste la homoj, kiuj interesiĝas pri novaj aferoj kaj estas scivolemaj pri ili, jam certe havas krom sia laboro ankaŭ aliajn hobiajn kaj interesojn. Prikonsideru vin mem: certe ankaŭ vi volonte legas aŭ aŭdas pri diversaj aferoj kaj laŭeble montras intereson pri ili, sed nur por disvastigi siajn sciojn, ne por profunde okupiĝi pli ili – pro la jam menciita fenomeno, manko de tempo.

Tial se iu ajn montras intereson kaj atente aŭskultas vin kaj ne plu estas videbla en la rilato al Esperanto, ankaŭ tio estas sukceso! Sukceso en la senco,

ke plia persono espereble almenaŭ parte memoras objektivajn informojn pri nia lingvo kaj ties ecoj. Kaj tio tre gravas, ĉar en publiko regas multaj antaŭjuĝoj rilate al Esperanto kaj batalo kontraŭ ili postulas eduki laŭeble multajn personojn pri la faktoj almenaŭ supraĵe.

Alivorte, levo de pozitiva opinio pri Esperanto estas same grava kiel trovi novan lernanton. Eĉ oni povas antaŭvidi, ke objektiva informado estas iuspeca preparo por trovi inter tiuj informitoj iun, kiu alpaŝos al Esperanto pli serioze aŭ eĉ komencos ĝin studi. Mi povas menci mian propran sperton. Mi komencis interesiĝi pri Esperanto kaj eĉ eklernis ĝin sensukcese kvarfoje (pro aliaj intertempe por mi pli gravaj interesobjektoj). Kaj nur post kvina rekomenco mi serioze eklernis ĝin ĝis Esperanto fariĝis parto de mia estaĵo. Tion mi detale priskribis en *Mia vivo*³.

Kiel alian ekzemplon mi povas indiki, ke mi instruis Esperanton al triaĝuloj. Mi havis kursanojn inter 70 kaj 92 jaroj. Estis sekvo de jam menciita radioprelego de Max Kaŝparŭ kaj mi ofertis tion kiel preventon kontraŭ Alzheimer-malsano. Multaj dirus, ke estas perdo de tempo, ja neniu el ili estos valora por la Esperantomovado. Sed mi scias, ke tio tamen valoris. De diskutoj kun miaj lernantoj mi eksciis, ke ili parolas pri Esperanto ene de familioj kaj inter amikoj, kiuj iam komence mokas pri ilia lernado, sed fine ankaŭ ili ion pri ĝi ekscias. Do – ankaŭ unu rimedo kiel disvastigi informojn pri nia kara lingvo. Pli da detaloj vi povas trovi en la jam dufoje menciita *Mia vivo*.

Utiligi informojn de neesperantistoj
Kelkfoje ankaŭ neesperantistoj, ofte eĉ profesie, ofte neintence, helpas al ni informadi pri Esperanto. Mi montras denove ekzemplojn.

Bibliotekoj: Kontrolu en proksimaj publikaj bibliotekoj, ĉu oni havas en la libra katalogo iujn librojn rilatantaj al Esperanto. Povas esti lernolibroj, vortaroj, legolibroj, eĉ io skribita en Esperanto. Ni akceptu moralan devon de tempo al tempo pruntepreni ilin kaj sekve redoni, eĉ sen malfermi ilin. Estas ja klare, ke neniu biblioteko havas sufiĉe da spaco por aĉetadi novajn librojn kaj konservi ĉiujn malnovajn. Tial oni de tempo al tempo likvidas tiujn, kiujn neiu prunteprenis iun difinitan tempon. Ĉu inter la likvidataj estos ankaŭ tiuj priesperantaj dependas de ni esperantistoj.

Atako aŭ primoko de Esperanto de iu gravulo: Se ni renkontos ion tian, ni konsideru tion bona ŝanco. Ni reagu, sed nek atakeme, nek ironie, sed trankvile, koncize kaj per trafaj argumentoj. Kiel ekzemplon mi menciuj, ke iama ĉeĥa prezidento Václav Klaus iam skribis, ke *La Lisbona kontrakto estas morta – same kiel Esperanto*. Mi reagis, krom alie, ke tio estas ofendo de lia kolego (Klaus estas laŭfakte profesoro pri ekonomiko) kaj Nobelpremiito pri ekonomiko prof. Reinhard Selten, kiu en la jaro 1996 dum la UK en Prago prelegis en Esperanto pri apliko de ludoteorio en ekonomiko. La rezulto estis dupaĝa artikolo pri Esperanto en *Ĉeĥoslovaka peza industrio* (aperanta en la ĉeĥa kaj angla versioj). Tion mi neniam estus sukcesinta, se mi ne reagus al tiuj stultaj vortoj de nia



Petro Chrdle dum EEK en Poděbray 2018.

prezidento. La artikolo titolis *Esperanto vivas spite al Klaus*. Parenteze: Estis Klaus, kiu post iom da tempo sub la politika premo subskribis la Lisbonan kontrakton nome de Ĉeĥio...

Kelkaj avertoj

Laŭ miaj spertoj kelkaj tro fervoraj esperantistoj malgraŭ bona intenco atingas eĉ malon: forpuŝas homojn de Esperanto aŭ ridigas ĝin. Mi do nun listigu kelkajn kutimajn ekzemplojn de tiu malĝusta informado kaj montru, kio estus pli prudenta:

Ne: Esperanto estas la plej facila lingvo.

Jes: Esperanto estas kelkfoje pli rapide lernebla ol naciaj lingvoj pro siaj ecoj (reguleco, logiko, unusencaj vortopartoj, ...)

Ne: Esperanto havas nur 16 gramatikajn regulojn. Efiko la sama (= lingvo primitiva).

Jes: Esperanto havas logikan gramatikon sen esceptoj.

Ne: Esperanto estas pli bona ol la angla, tial ĝi devus anstataŭigi ĝin en internaciaj rilatoj. (Tio en okuloj de neesperantisto estas ridinda deklaro de fanatikulo.)

Jes: Esperanto estas tre taŭga por internacia komunikado kaj donas ŝancon ankaŭ al tiuj, kiuj ne havis eblon aŭ kapablon flue ekregi la anglan.

Ktp.: ne kontraŭ la angla, ne troigi la eblojn de Esperanto, ne promesi nerealaĵojn, ...

ne ridigi sin kaj precipe Esperanton en okuloj de neesperantistoj.

Resumo

Ni evitu la vorton *propagandi*, ĉar ĝi efikas negative.

Ni strebu levi intereson per mencioj, ne per trudoj.

Ni ne malĝoju, se la interesato ne deziras (tuj) lerni Esperanton.

Ni estu paciencaj, ne superŝutu la interesaton per centoj da informoj (klarigante la tutan gramatikon). Strebu igi lin demandi, ĉar kiu demandas, tiu perceptas.

Ni evitu adjektivojn *la plej simpla, la plej facila, la plej ...*

Se ni diros, ke Esperanton eblas ellerni dum kelkaj tagoj, aldonu la kondiĉon *konante bone unu latinidan, unu ĝermanan kaj unu slavan lingvojn.*

Ni subtenu informadon flanke de neesperantistoj (ekzemple bibliotekoj).

Kaj precipe ni neniam troigu la eblojn de Esperanto, nombron de esperantistoj en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo, riĉan fakan literaturon, ... por ne produkti trompitan interesaton = malamikon de Esperanto.

Notoj —————

1. Prof. dr. Max Kašparů, populara ĉeĥa psikiatro, krome ankaŭ sacerdoto kaj esperantisto.
2. Petr Chrdle: *Mia vivo kun Esperanto*, ĉapitro *Informado pri Esperanto* sur la paĝoj 75 – 83. Eldonis KAVA-PECH, Dobřichovice, 2023, 251 p.
3. Petr Chrdle: *Mia vivo kun Esperanto*, p.7 –13

☞

Pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa.

Zamanhofa proverbo

Ĉiama memorendaĵo – ĉijare 80-jara

Mesaĝo de UEA

En la Tago de Holokaŭsta Memoro ni rememoras tion kio povas rezulti el malrespekto kaj malestimo al homaj rajtoj. Estas nia devo, kiel homaro, malpermesi kaj eviti la ripeton de genocidoj kiel tiuj faritaj de la nazia reĝimo. La Holokaŭsto estos, por ĉiam, averto al ĉiuj homoj pri la danĝeroj de malamo, maltoleremo, rasismo kaj antaŭjuĝo.

Ni ankaŭ memoras la kuraĝon de pluraj homoj, soldatoj kaj civiluloj, kiuj batalis kaj agadis, ĉu por liberigi la koncentrejojn, ĉu por helpi tiujn kiuj fuĝis de la terura persekuto.

Esperanto, kiel lingvo kaj idealo, estis rekte atakata de naziistoj, kaj esperantistoj estis persekutataj kaj mortigitaj. Preskaŭ la tuta familio de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto, estis ekzekutita, aŭ murdita en koncentrejoj. Tamen, malgraŭ suferado kaj danĝeroj, multaj esperantistoj ankaŭ helpis la savadon de aliaj potencialaj viktimoj.

La homa vivo estas prioritato super ĉiu alia afero homa. Ĉiuj homoj, senescepte, havas rajtojn al vivo, libereco kaj sekureco. Ni laboras por interkompreniĝo kaj estimo inter la homoj pere de la internacia lingvo Esperanto, favore al mondo kie ĉiuj homoj kaj lingvoj estas liberaj kaj egalaj en digno kaj rajtoj, kaj la homa vivo estas sekura.

Ni do reasertu la celojn kaj principojn enskribitajn en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, same kiel en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ni kune kreu mondon kie ĉiuj kondutas unu al alia en spirito de frateco, kaj havas la samajn rajtojn, sendepende de kia ajn diferencigo, inkluzive laŭ lingvo.

Mallonga ligilo por tiu ĉi komuniko: uea.org/gk/1209a1



Fino de Esperanto-fako de KAVA-PECH

Informas Petro CHRDLE, CZ

Kiel videblas de la kompleta nomo de la mallongigo KAVA-PECH *Kongresová A Vzdělávací Agentura PEtra CHrdleho*, (Kongresa kaj Kleriga Agentejo de Petr Chrdle), ĝia celo origine ne estis eldonado de libroj.

La agentejon mi fondis en la jaro 1991, sed jam en la jaro 1992 mi eldonis la unuan libron. Ne pro emo fariĝi eldonisto, sed pro bezono mem eldonadi la prelegkolektojn el de mi organizitaj fakaj eventoj. Ili estis plejparte en la ĉeĥa kaj germana; nur pli poste, kiam mi sentis min ekonomie sufiĉe forta por riski malprofiton, mi komencis agadi ankaŭ por esperantistoj. La unuaj Esperanto-aranĝoj estis la kolokvo por Akademio de Esperanto kun eldonita prelegkolekto *La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto* kaj la kongreso de SAT en Strážnice kun ĝia antaŭkongreso en Prago paralele kun la AdE-kolokvo.

Mi ankaŭ kunlaboris kun ILEI. Dufoje mi organizis ILEI-konferencon (en Karlovy Vary 1999 kaj en Bratislava 2004) kaj ene de InPaSem (de mi regule organizita ĉiun duan jaron Internacia Paroliga Seminario) 2006 mi organizis la lingvajn ekzamenojn de ILEI/UEA (ekzamenantoj Stefan McGill, Albrecht Kronenberger kaj Miroslav Malovec).

Sekve, la eldonado de libroj fariĝis hobia por ni (mi kaj mia edzino Stanjo), do ni komencis, krom nia ĉefa organiza

agado eldonadi ankaŭ aliajn librojn, ne nur prelegkolektojn, inkluzive de tiuj en Esperanto. Ĝis la jaro 2024 KAVA-PECH eldonis 262 librojn, el ili 108 en Esperanto. Do tiuj 108 libroj kreas la Esperanto-fakon de la eldonejo. Klare, ne ĉiuj estas ankoraŭ surstoke.

En produktado de ĉeĥaj kaj Esperantaj libroj ne estas granda diferenco. Male estas tre granda diferenco en ilia distribuado. Por la ĉeĥaj mi havas ekskludan librodistribuanton KOSMAS, do tio postulas de mi preskaŭ neniun administran pezon. Ĉiumonate laŭ la anonco pri nombro de venditaj libroj mi sendas al Kosmas fakturon, librotenado estas simpla, same kiel la impostdeklaroj (kvarfoje jare pri AVI2 kaj unufoje jare pri gajno/malgajno).

Tute aliaj estas burokrataĵoj kunigitaj kun la distribuo de la libroj en Esperanto, plejparte eksterlanden. Eĉ se en ridinde malgrandaj volumoj, ĝi devas plenumi, precipe ĉe AVI-pagantoj, ĉiujn trajtojn de la internacia komerco: apartan evidencon de la vendoj ekster Ĉeĥion, aparte al EU-landoj, se la partnero estas ankaŭ AVI-paganto (ekzemple UEA, germana libroservo, ...) kaj ĉiumonate deklari evidencan devon rilate al la AVI-pagantoj; sed ankaŭ al eksterEU-landoj, kiuj krome devas esti dogane pritraktataj plenumo de jure devigaj statistikaĵoj (sub altaj punminacoj), ktp.



Esperantumado en Vác 2024. Pavel Polnický, Ruth v. Puijenbrock, Petro Chrdle kaj Tereza Nemere.

Kaj, ĉiu korespondado kun la klientoj okazas en Esperanto. Kiun dornoplenan vojnon mi devis trairi, antaŭ ol la financofice komencis akcepti la dokumentojn en Esperanto, mi priskribis en la verko *Mia vivo kun Esperanto*.

Tion ĉion mi havis en mia cerbo, kiam mi batalis kontraŭ morto dum du sinsekvaj danĝeraj malsanoj post kovimo kaj ĉe la notario, kiam mi faris testamenton. Mia plej aĝa filino, kiu heredos mian firmaon, certe ĝin likvidos, sed antaŭ tio ŝi devos plenumi ĉiujn restantajn kontraktojn kaj devontigojn. Tio certe ne estos problemo rilate al la ĉefaj libroj, sed terure komplika por ŝi, nekono de komercaj leĝoj, des pli, ĉar ŝi ne scipovas Esperanton.

Tial mi decidis laŭeble baldaŭ liberiĝi de la Esperanto-fako, tamen ne volis likvidi la restantajn librojn en Esperanto. Mi do strebis trovi iun, kiu transprenus ilin, sed ne trovis. Tamen ekbrilis eĉ pli bona solvo: François Bolduc el kanada Montrealo, kiu ĝuste en tiu tempo planis fondi eldonejon por eldonadi Esperanto-librojn, ofertis al mi, ke li transprenos mian eldonejon kaj daŭrigos ĝian agadon. Ni faris kontrakton kaj lasis ĝin kontroli ĉe juristoj, por ke ĝi kontraŭu nek la

ĉefan, nek la kanadan juron.

Kaj tiel okazis. Li ankaŭ aĉetis kontraŭ forte rabatitaj prezoj profunde sub la produktokostoj (klare, ĉar plejparton li ne sukcesos disvendi) la reston de la stoko de la libroj en Esperanto. Parton mi sendis al li en Montrealon, parton transprenis persone lia kunlaborantino el Budapeŝto Stela Besenyey-Merger.

Provizore, ĝis la nova eldonejo *Les éditions KAVA-PECH* havos propran retejon, la mendojn de eksterlande plu kolektos mia retejo

<https://kava-pech.cz/esperanto>

kaj mi plusendos ilin al Montrealo kaj Budepeŝto. Jen la retadreso de mia daŭriganto Les Éditions KAVA-PECH:

kavapech1@gmail.com

Fine mi volas ĝustigi misfamojn pri mi, kiuj venis al miaj oreloj:

Unue, mi ne kabeiĝas, male mi nun havos pro malpli da burokrataĵoj espereble pli da tempo por esperantumi: vizitadi la Esperanto-aranĝojn, verki, ...

Due, KAVA-PECH ne bankrotis kaj ĝi plu ekzistos, nur ne plu agos internacie pro pli supre menciitaj kialoj,

Trie, mi ne estas mortanta (almenaŭ mi kredas!) kaj danke al Dio kaj al miaj kuracistoj mi jam denove fartas relative bone. Jes, mi devas glutadi amason da medikamentoj kaj regule subiĝi al diversaj sankontroloj, sed sciante, ke kun malnova aŭto oni devas ofte vizitadi aŭtoriparejon, mi komprenas, ke kun maljuna korpo mi devas vizitadi simile la korporiparejojn. Sed tamen mi povas plu ĝui la vivon kaj Esperanton, eĉ se kun iuj limigoj.

Petro Chrdle,

chrdle@kava-pech.cz

Financa raporto de KELI 2024

(ĉiuj sumoj en EUR)

Bilancoj fine de la jaroj 2023 2024

Aktivoj

Stoko de libroj	4.432,50	3.939,97
Stoko de kasedoj, E-Misio	104,40	92,80
<i>Provizo</i>	<u>4.536,90</u>	<u>4.032,77</u>

Kasista kaso	1.035,00	2.569,00
Sekretaria kaso	426,00	1.513,00
UEA-konto kelk-p	2.095,10	3.743,05
Ĝir-konto, CIC-banko	1.765,08	988,16
Ŝpar-konto, CIC -banko	<u>41.565,47</u>	<u>38.341,16</u>
<i>Monrimedoj</i>	<u>46.886,65</u>	<u>47.155,19</u>

Sumo de aktivoj 51.423,55 51.187,96

Pasivoj

Kapitalo	30.819,68	29.574,53
Rezulto de la jaro	-1.245,15	-478,46
<i>Kapitalo entute</i>	<u>29.574,53</u>	<u>29.096,07</u>

Dumvivaj membroj	1.296,50	1.178,50
E-Misio	6.894,51	6.894,51
Helpa kaso	560,08	610,08
Kongresa rezerva kaso	403,48	403,48
Literatura/Himnara kaso	<u>12.903,45</u>	<u>11.880,32</u>
<i>Fondusoj entute</i>	<u>21.539,02</u>	<u>20.966,89</u>

Kreditoroj	0,00	0,00
Evidente	215,00	570,00
KELI-abonoj de EK	0,00	0,00
Kongresaj kotizoj	<u>100,00</u>	<u>510,00</u>
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>310,00</u>	<u>1.125,00</u>

Sumo de pasivoj 51.423,55 51.187,96

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2024.12.31

Aktivoj

Stokoj

La estraro decidis, ke dum la sekvontaj dek jaroj la valoro de la stokoj estos malaltigita per dek procentoj jare (ĉe libroj 492,5 eŭroj, ĉe kasedoj 11,6 eŭroj). Ni klopodos fordonaci librojn kaj kasedojn al nepagipovaj landoj.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös HU.

Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.

KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe la franca CIC banko (ĝir- kaj ŝpar-konto).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj.

La rezulto de la jaro 2024 estis laŭplane negativa: - 478,46 Eŭroj.

Fondusoj

Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj.

Estas plano simpligi nian librotenanadon per kunmetado, sumigo de la diversaj kasoj.

Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2024 ni havis kongreson (en Vác, Hungario). Dum la kongreso ni kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). Ankaŭ sendis KELI-anoj tiucele monon al la bankkontoj. La sumon kiel kutime ni ĝiris al la fonduso helpi tiun laboron, kiun komencis Jacques Tuinder NL.

Aliĝantoj al nia poste nuligita kongreso en 2025 pagis la aliĝkotizon al KELI bankkontoj, tiu sumo estis reĝirita, aŭ estos ĝirita al LKK de 2026.

Rezulto 2024 kaj buĝetoj 2024, 2025 kaj 2026 (ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2024	Rezulto 2024	Buĝeto 2025	Buĝeto 2026
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	1.600	1.664,00	1.400	1.400
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	25,40	0	0
Adopta Kaso	100	10,00	80	80
<i>Kotizoj entute</i>	<u>1.700</u>	<u>1.699,40</u>	<u>1.480</u>	<u>1.480</u>
Librovendado	50	40,00	40	40
Rentumoj	500	776,51	500	500
Profito el kongreso	0	85,00	0	0
<i>Aliaj enspezoj</i>	<u>550</u>	<u>901,51</u>	<u>540</u>	<u>540</u>
Enspezoj entute	2.250	2.600,91	2.020	2.020
Elspezoj				
Presado + sendado de DR	2.300	2.663,00	2.000	2.000
Perantoj	0	0,00	0	0
<i>Revuokostoj</i>	<u>2.300</u>	<u>2.663,00</u>	<u>2.000</u>	<u>2.000</u>
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	150	150,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	20	20,00	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	<u>260</u>	<u>260,00</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
UEA-kotizo	50	44,00	50	50
Bankkostoj	120	89,87	120	120
Merituloj	50	0,00	50	50
UK Lukostoj	40	22,50	40	40
<i>Generalaj kostoj</i>	<u>260</u>	<u>156,37</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
Librovendado (kostoj)	0	0,00	0	0
Varbado (Inf./varba kaso)	0	0,00	0	0
Malprofito de la kongreso	0	0,00	0	0
Rabatoj de perantoj	0	0,00	0	0
<i>Aliaj elspezoj</i>	<u>0</u>	<u>0,00</u>	<u>0</u>	<u>0</u>
Elspezoj entute	2.820	3.079,37	2.520	2.520
Saldoj	-570	-478,46	-500	-500

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2024 kaj la Buĝetoj 2025/2026

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj en 2024 estis laŭ niaj planoj – estu danko por ĉiuj membroj pro tio. Al la Adopta kaso alvenis malpli da mondonacoj ol ni esperis. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui „laŭforte”.

Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

Aliaj enspezoj

Librovendado estis malpli, sed la rentumoj estis multe pli altaj, ol ni planis. Aliaj enspezoj ne okazis.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2024 ni per la kutima simbola sumo dankis la laboron al nia prezidanto, sekretario, redaktoro kaj kasisto.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2024 estis la UEA-kotizoj kaj la Bankkostoj.

Laŭkutime ni pagis la duonon de la lukosto de salono dum UK.

Aliaj elspezoj

Aliaj elspezoj ne okazis en la jaro 2024.

Saldoj

La saldo de la jaro 2024 estis bedaŭrinde negativa: - 478,46 eŭroj.

Nia membraro malnombriĝas, sed ĝis la ekonomiaj eblecoj permesas, ni planas daŭre funkciigi nian Ligon. La du gravaj partoj de nia funkciado: eldoni nian revuon surpapere (kaj ne rete), kaj organizi enhavriĉajn, interesajn kongresojn por kotizo, kiom eble plej multaj partoprenantoj povas pagi. Ambaŭ partoj bezonas subtenadon, sed la estraro kredas, ke tiel ni korekte uzas la mondonacojn de niaj nunaj membroj kaj de niaj antaŭuloj. La financa bazo de KELI daŭre estas sufiĉe kontentiga.

Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2025 kaj 2026 tamen enhavas negativan rezulton.

Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon

Klasikaj filologoj de ĉiuj landoj unuiĝu !

Lernintoj de (malnov-) Greka, (malnov-) Hebrea
aŭ Latina lingvoj serĉataj

Multaj esperantoparolantoj scias, ke Zamenhof mem tradukis la Malnovan Testamenton el la Hebrea kaj Aramea lingvoj al Esperanto. Brita komitato tradukis la Novan Testamenton el la Greka. Tiuj tradukoj jam aperis aparte antaŭ la unua Mondmilito, sed nur en 1926 ambaŭ partoj de la Kristana Biblio aperis kune en unu volumo.

Do la jaro 2026 estos la jubilea jaro de la unua, plena eldono de la Biblio en Esperanto. (Tial okazos inter la 8a kaj 15a de aŭgusto 2026 Kristana Kongreso en Gerlico, Germanio, pri la temo: *La Biblio, ponto inter kulturoj.*)

Por tiu jubila jaro mi serĉas lernintojn de la antikvaj lingvoj Greka, Hebrea, Aramea kaj Latina, kiuj – almenaŭ je baza nivelo – scipovas almenaŭ unu aŭ plurajn el la menciitaj lingvoj kaj ja scipovas Esperanton.

En reta laborgrupo ni komparos la tradiciajn, esperantlingvajn tradukojn kaj kun la originlingva teksto kaj ankaŭ kun la fruaj (ĉu grekaj, ĉu latinaj) tradukoj.

Ni ne tradukos la tutan, tro ampleksan Biblion, sed nur kelkajn partojn el ĝi komparante la ekzistanta(j)n traduko(j)n kun la hebrea kaj greka teksto.

Ĉar, laŭ mia supozo, nur malmultaj lernis la Hebrean, mi proponas, ke nia

grupo koncentriĝu pri tekstoj el la Nova Testamento, kiu estas skribita en malnovgreka, Helena lingvo. Tiu nocio aŭ “Kojneo / κοινή” estas uzata por la greka lingvo post la “klasika” epoko.

Religia fono aŭ konfeso ne necesas, nur baza scio de almenaŭ unu el la menciitaj antikvaj lingvoj. Ni kune decidus pri tekstoj, kiujn mi dissendos en la antikvaj lingvoj al la grupanoj. Mi ankaŭ rekomendos seriozajn helpilojn, kiuj senkoste troveblas en la reto: vortaroj, tekstaroj, ...

Kiam ni komencos?

Mi proponas la tempon post la someraj ferioj (do aŭguste), eble kun unu antaŭa kunveno por decidi pri laborplano kaj unuaj tekstoj.

Se Vi do havas intereson aŭ konas interesitan esperantoparolanton, mi ĝojos pri retmesaĝo al:

wolfram.rohloff@seznam.cz

Mi dankas kaj antaŭĝojas, via
Wolfram Rohloff

Informoj

Atento pri estrarelekto

Ĉar ne okazos ĉi-jare kongreso kaj do ne la kutima jarkunveno de KELI, ni petas vin, kiu estas membro, ke vi skribu letere aŭ retmesaĝe al sekretario Pavel Polnický, ĉu vi konsentas kun plilongigo de la deĵorperiodo de la estraranoj Philippe COUSSON (prezidanto) kaj Agnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS (kasistino) ĝis la venontjara kongreso en 2026 (vidu suban tekstokadron). La adreson de la sekretario vi trovas sur paĝo 50.

Pavel Polnický
sekretario

Bildo de la reto de Eventaservo.org

 **Kristana Kongreso 2026** 

La 74-a Kristana Kongreso de KELI okazos en la belega mezgranda urbo Görlitz en orienta Germanio, apud la landlimo al Pollando

08  **15**
2026 sabato 2026 sabato

★ Internacia Evento Kunveno/Evento

Kiel temon de la kongreso, ni antaŭvidas "La Biblio - ponto inter kulturoj", okaze de la centjariĝo de la Esperanta Biblio (1926-2026).

Informojn pri la kongresejo oni trovas en germana lingvo ĉi tie: <https://www.cvj-m-schlesien.de/website/de/sol/gastgeber/peregrinus-cvjm-herberge>

Ĝi havas 11 ĉambrojn kun entute 40 litoj. Proksime al ĝi troviĝas ankaŭ diversaj hoteloj kaj pensionoj.

Kelkaj vizitindaj retpaĝoj

- Eventoj esperantaj ĝenerale: **eventaservo.org**
- Pri aranĝoj de KELI: **eventaservo.org/o/KELI**
- Kristanaj tekstoj, kantoj, Dia Regno ktp.: **fontoj.net**

Survoje sur la tero

M: Gut Gsell und du musst wandern

1. Sur - vo - je sur la te - ro,
2. Nek sku - o eks - ter nor - mo

tra ĝo - jo kaj su - fe - - - ro,
te - ru - ru min, nek ŝtor - - - mo.

en luk - so kaj mi - ze - - - ro
Ĉu vig - la, ĉu en dor - - - mo:

mi vo - las fi - di Vin.
ŝir - ma - ta es - tos mi,

Vi min ne - ni - am la - sos,
ŝir - ma - ta sur la stra - toj,

eĉ se mi la - sus Vin.
ŝir - ma - ta en la dom'.

Fi - din - da Di', mi - rin - da Di',
Ho - glo - ra Di', bon - ko - ra Di',

Vi a - mas min sen fin'.
ma - jes - tas Vi - a nom'.

SURVOJE SUR LA TERO • M (Gut Gsell und du musst wandern): germana popolkanto, 1603 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2018-01-09